

PENSEO

N-ro 238

Aŭg. / 2011

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 22-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Josip Pleadin (Kroatujo)



EN LA ĈAMBRO 111

Valizo peza
penso freneza ...
La ĉambro 111.
Lito kompleza ...
Sub silka dormvesto
mallarĝa talio.
Ho, Dio ...
Vi estas mia ĉio!
Mistera amo ardrublas,
koketas vi en sonĝo kaj realo ...
Kuŝo ... kunkuŝo,
buŝo apud buŝo.
Lipoj en koloro de tulipoj,
miaj karesoj sur viaj ripoj.
Modera kunesto
fariĝas festeno
por sentoj kaŝitaj,
por sentoj revitaj,
kaj por tiuj amkoloraj,
florantaj, maturaj, doloraj ...
Fantasta kuraĝa mondo
kaj via blondo ...
Mirakla beno de la sorto
sen vorto, sen zorgo ...
Ĉe via brusto alpremita
per amo mi estis premiita
en ĉambro 111.
Per amo forta kaj pasia,
kvazaŭ mem dioj plenumus ĝin.
Ruĝas sango de vitoj
en glasoj surtable ...

Sonoj de noktaj busoj
sufokas la sonojn de amorado.
Mortas la sonoj,
naskiĝas nova tago
en malplena ĉambro 111.



Erzsébet Tuboly (Hungarujo)



Eksterordinare varmega vetero

Mortiga Suno
Belegajn verdajn kampojn
Igas dezerto

Cikoniidoj
Staradas en la nesto.
Tridek sep gradoj.

Ĉe vojoorando
Jen sekiĝantaj ranoj.
Kion atendi?

Varmega vento
Turmentas la arbaron.
Falas folioj.



Helena Tylipska (Italujo)



LA NOKTO

La nokto aliras sunleviĝon:
Unu alia nokto sendorma
Plenigis menson de pensoj.

Ĉiele muĝis aviadiloj
Flugantaj sud-orienten
Por vakigi siajn ventrojn.

Iuj priploras la mortintojn,
Dion de milito malbenas
Kaj ties servantojn.

Prenu iom, de mi,
da mia liberec',
kiun mi ne eluzis,
donu ĝin al la vivaj,
kiuj pacon ne konas ;

—Unu manplenon da PACO.



Chico Buarque de Hollanda

Kun suker', kun korinklino

(Kantteksto)

Kun suker', kun korinklino, konfitaĵon kun
rafino
de l' kutim' por vi mi faris. Ĉu por vi?
Belvestita per kompleto vi eliras sen kis-peto,
sed la mison ne riparis.

Ke vi estas laboristo, diras vi, kaj ke por
“gisto”

vivotena vi jam iras. Kredu mi...
Sur la voj' al la laboro ĉiu bar' sen ferma horo
multe pli por vi altiras. Ne kredas mi!

Scias mi tie kunsido ja okazos sub egido
de pasiflama futbol',
kaj por gvataĉ' al la jupoj de knabin-pasantaj
grupoj,
ĉu ne natura regal'?

Venas nokt' kun glas-multopo, alte ĝoja “ma
non tropo”
ĉu ne volos kanti vi?

Kaj sur alumet-skatolo novamik' kun kia volo
taktos sambon je defi' .

Nokt' vin hejmen finirigas, kvazaŭ do infan'
prodigas

vi kun pardonpetoj mil. Kredu mi...

Ke ne plu vi min ĉagrenos, ke alie vi sintenos,
diras vi ja kun humil'.

Kaj vidante vin tielan, lacan, ĉifonulnivelan,
ĉu sinĝeni devas mi? Ho ne mi!

Via manĝo jam tuj pretas, kaj de vi mi kison
petas

brak-aperte nu al vi.

* *Chico Buarque estas unu el plej fertilaĵ
brazilaj komponistoj de popularaj kantoj.
Lastatempe ankaŭ montris sian talenton kiel
verkiston.*



Ferreira Gullar

Momenton

Jen mi miece
Senmemkona

nelaŭsinmemvolinta

senkomenca
senfina

Jen mi miece
seneca

neni-memora
sencia

Laŭ la tekstoellaboro
jen mi kaj skeĉo
Kaj sen metaforo

**Ferreira Gullar estas brazila poeto iam indikita al literatura nobelpremio pro inventivo de liaj versoj kie paralele ĉeestas deca inklino al sociaj kaŭzoj.*



Elportugaligis



Ŭel (Brazilo)

**José Moreno Hurtado kaj
Luis Moreno Salguero**

Elizabet' (María Isabel)

Sur tute dezerta plaĝo, ni du naĝis en liber',
kaj mia gitaro sonis nur por vi Elizabet'.
Sur tute dezerta plaĝo, ni du naĝis en liber',
kaj mia gitaro sonis nur por vi Elizabet'.

Prenu la ĉapelon, surmetu ĝin.
Sunas kaj la plaĝo atendas nin.
Prenu la ĉapelon, surmetu ĝin.
Sunas kaj la plaĝo atendas nin.

Ĉiribiribí po po pon pon...

Ĉiribiribí po po pon pon...

Sur la sablo jen vian nomon mi skribis, sed
ĝin mi mem
forviŝis por ke neniŭ tretu ĝin, Elizabet'.
Sur la sablo jen vian nomon mi skribis, sed
ĝin mi mem
forviŝis por ke neniŭ tretu ĝin, Elizabet'.

Prenu la ĉapelon, surmetu ĝin.
Sunas kaj la plaĝo atendas nin.
Prenu la ĉapelon, surmetu ĝin.
Sunas kaj la plaĝo atendas nin.

Ĉiribiribí po po pon pon...

Ĉiribiribí po po pon pon...

La luno ĵaluze palis, la steloj lumetis for,
dum viaj okuloj brilis kaj galopis mia kor'.
La luno ĵaluze palis, la steloj lumetis for,
dum viaj okuloj brilis kaj galopis mia kor'.

Prenu la ĉapelon, surmetu ĝin.
Sunas kaj la plaĝo atendas nin.
Prenu la ĉapelon, surmetu ĝin.
Sunas kaj la plaĝo atendas nin.

Ĉiribiribí po po pon pon...

Ĉiribiribí po po pon pon...

Originala titolo: *María Isabel*

Tradukis



Svena Dun (Hispanujo)



Heinz Kahlau



Mi amas vin

Mi amas vin
signifas ankaŭ:
Venu,
gedormu kun mi.

Ĝi povas signifi ankaŭ:
Lasu nin havi infanojn.
Mi amas vin.
Mi estas
tre volonte ĉe vi.
Lasu nin esti kune
ĝis la entombigado.

Mi amas vin
signifas ankaŭ:
Estu bone al mi,
faciligu la vivon al mi,
kiun mi ne majstras.
Se mi estus sola,
mankus al mi la kuraĝo.
Mi amas vin,
faru, ke ĝi sukcesu al ni.

Mi amas vin,
signifas ankaŭ:
Fierigas min,
ke vi deziregas min
pli ol aliajn.
Kaj, ke vi al mi, nur al mi
kaj al neniu alia
kun ĉio, kio vi estas,
apartenas.

Mi amas vin
povas signifi:
Bonvolu, estu tiel
kiel mi vidas
la alian,
kiun mi serĉas.
Plenumu miajn revojn,
ĝojigu min,
por ke mi konfirmite
iru tra la vivo.

Mi amas vin,
signifas ankaŭ:
Mi volas esti tiel,
kiel vi bezonas min -
mi volas fariĝi via ombro.
Tiom utila estas neniu al vi, nur
mi
povas fari ĉion por vi
sur tiu ĉi Tero.

Mi amas vin
signifas ĉiam:
Mi volas havi
vin por io,
kiu promesas feliĉon al mi.
Kelkfoje el tio ekestas:
Ni amas nin.
Nur tiu frazo
vere gravas.

elgermanigis



Cezar (Germanujo)




Paŭlo Sena (Brazilo)



DUFLANKA ELEKTO

Blankaj blovoj plenplenaj de plumoj
Kontraŭ kisoj rozruĝaj kaj ravaj.
Palaj pajloj dancante sur dunoj
Kontraŭ kruroj de korpoj tre grasaj.

Neĝaj ŝafoj en marĉoj malhelaj.
Sanktaj movoj de vestoj malpuraj.
Reĝaj tronoj sur bazoj danĝeraj.
Cirklaĵ ĉambroj, "jes ja!": kvarangulaĵ!



HISTORIO DE (MAL)KONVENA SILENTO

Pensoj kunfluiĝis en rondan kunsenton:
La malsimileco ne nepre necesis.
La buŝoj sin fermis timante ofendojn,
Ĉar en akvoglas' la pensar' jam tempestis.

Sed oni aŭskultis, ke l' fundan silenton
Silentigis kava kri', kiu ne ĉesis;
Kiu daŭris, kiu la mensajn defendojn
Frakasis... kaj nubo de dubo ne restis.



Xu Zhimo (1897-1931)



Ĝojo de neĝero

Se estas mi neĝero,
mi plume flirtas en aero.
Mi certas pri direkto mia—
jen flirtas, flirtas, flirtas—
al ĝusta loko sur la tero.
Mi celas ne al malhela valo,

nek al montet' kun trista la vualo
nek al soleca strato por mizero—
jen flirtas, flirtas, flirtas—
Hej, mi ja direktiĝas en trafalo!

Mi dancas elegante kun espero,
Celante al kvieta la loĝejo,
atendas ŝian enĝardenan promenadon—
jen flirtas, flirtas, flirtas—
Aĥ, ŝi aromas je ume-petalo.

Tiame mi per mia korp-leĝero
Alkroĉiĝas al ŝia vest-ekstero,
proksime al ŝia milde ondetanta
brust-tenero —
mi dissolviĝas, dissolviĝas, dissolviĝas—
en ŝian milde ondetantan brust-teneron!

Elĉinigi



Vejdo (Ĉinio)



Ĉineske

Eto (Ĉinio)

Vagabonda kantisto

—laŭ ĉineska skemo Yexingchuan*

I.

ekde mia forvetur'
mi kovras
per mia spur'
vojojn montajn
kaj laŭrojajn
por fola aventur'

sur vasta step' sen mezur'
mi dormas
jen kun plezur'
en malgranda
movebla tend'
en la venta murmur'

II.

nokte sub la klara lun'
mi ludas
per verda jun'
la gitaron
kor-trankvile
ĉe kvieta lagun'

bela knabino ho nun
ne amas
min per brakum'
ĉar mi morgaŭ
vagabondos
ree sen via kun'

*Yexingchuan (nokta ŝipvojaĝo): ĉina
fiksforma poemo el du strofoj kun ses versoj

de 7,34,446 silaboj, laŭ rimarangō a,xa,xxa (x
= senrima)



Sabla ŝtormo

—laŭ ĉineska skemo Daolianzi*

bruneta
vualo

kun fajna sabla falo
pendas super rivero
tero kaj loĝkvartalo

forfuĝas
la homoj

per sableroj la domoj
kovriĝas hermetike
sub prem' de sablaj vomoj

kial do
al mondo

terura sabla ondo
ofte faras atakojn
nur homar' kun respondo



Cindy Mckee (Usono)



En la momento mem

—laŭ ĉineska skemo Daolianzi*

Persiko
en teo.
En gorĝo jubileo.
Mi ne mokas suferojn
nek deliras per neo.

Persiko
en teo,
ĝoja en spontaneo.
Mi ne konas la ravon,
fajfas pri panaceo!

Persiko
en teo,
deĉina du-ŝoseo
amoras mian langon,
igas *numon* solkreo.



*Daolianzi (*Kanto de lavantino*): ĉina fikforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

Yanke (Ĉinio)

Nokta nebulo

—laŭ ĉineska skemo Caisangzi*

falas nokta nebulo
tre leĝera

tre ĥimera
super fluo rivera

lampoj lumas en svago
jen prospera
jen malvera
kun koloro butera



*Caisangzi (*moruskolektanta knabino*): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)

Anteo (Ĉinio)



Ludo fatala

li mortis en kampo de sorgo. tie troviĝas laĝetoj,rivero kaj monteto. li sin mortigis trinkante insekticidon. la kvar membroj etendiĝis, kaj la okuloj malfermiĝis. kvazaŭ li aprezus la bluan ĉielon kuŝante sur la dorso inter sorgoplantidoj. ĉe la korpo troviĝis kuloteto. strange! ĉar li neniam surhavis kuloteton.

jes,li tiel aprezis la similan ĉielon antaŭ nelonge,kune kun la najbara vidvino. ili kune sin lavis en unu el la laĝetoj ĉe la digo de la rivero. kaj la monteto gardis ilian agadon for de ebla rigardo. vespere la vilaĝanoj trans la monteto preparis sian manĝon. al ili du nur la subiranta suno trans la rivero ridetis kun moko kaj malico. ili kuŝis en la kampo de sorgo,parolante pri nuboj, vento, kalabaskukurbo, fonto. ili volis fariĝi nuboj sur la ĉielo;vento estus ilia veturilo. por li ŝiaj mamoj estis freŝaj kalabaskukurboj

kaj al ŝi plaĉis lia ejakulado kiel fonto. fakte ili ne estis pekaj. li helpis ŝin en multaj aferoj; ŝi estis lia konsilanto kaj li ŝin bezonis. 25jara li restis sola, dum 30jara ŝi vidviniĝis antaŭ 3 jaroj kaj havis du infanojn. liaflanke, en la familio troviĝis 6 gefratoj; la patro mortis pro la hepata kancero; kiel la plej aĝa filo li ne kapablis bone vivteni la familion. lia plej juna frato estis bebo, kaj la patrino, malsanema. pro la propra peza ŝarĝo de la familio, ili ne povis facile geedziĝi, speciale ĉar li suferis je favo kaj leporlipon.

virinoj en la vilaĝo ofte prenis nealtan lin kiel simion. somere ili demetis lian kuloton sur la draŝejo iam kaj iam, kaj ĵetis ĝin sur la tegmenton de la grentenejo. ĉiufoje ili ridegis vidante ke li nuda grimpas sur la pajla domo. kaj de tempo al tempo viroj petis lin nudigi sin kiam ili kune akvolevis sur norio. ĉiuokaze li ne koleris. li estis dankema ĉar en la aĝo de 12 jaroj li suferis je uretra kalkuluso kaj la vilaĝanoj kolektis monon por ke li ricevu operacion en urbo. de tiam lia penis estis komuna aĵo kiun la pliaĝaj vilaĝanoj povis vidi laŭplaĉe. tiu ĉi regulo validis de lia knabeco ĝis lia juneco; la vilaĝanoj estis okulaj testantoj pri lia maturiĝo – la ŝanĝado de lia pubo.

post kiam li fariĝis tute matura, detenante sin de la nudiga ludado ŝatata de la virinoj kiuj, relative pli maljunaj ol ŝi, nokte povis ludi sian edzon, okaze de la koboldaĵoj la vigla vidvino ankaŭ iam subrigardis lian seksilon kun ĉiam malkaŝita glano. eble li sin masturbis tro ofte. dum lia knabeco ĝi ne estis tia. kompare, ĝi aspektis multe pli longa kaj dika ol tiu de ŝia edzo, kaj pli bela ol la vizaĝo de la posedanto.

iom interkompatiĝante, ili ekludis la penison nepublike. tion li ŝatis. ankaŭ ŝi. sed nur per la manoj. ŝi ne permesis al li tuŝi ŝiajn sekretaĵojn kaj li ankaŭ ne petis de ŝi la reciprokon.

iutage, li vidis ke ŝi sin karesas la partojn ĉe sinbanado. kiel allogaj la mamoj kaj la pubo! absolute ekster lia kapablo priskribi.

poste li provis palpi la partojn kiam ili private ludis. neatendite ŝi ne rifuzis. tamen li neniam sciis kison kaj ŝi ne volis kisi kun li ĉar li havis la naŭzan leporlipon.

kaj pli poste ŝi lasis lin eniri ŝian korpon.

li volis kunvivi kun ŝi. sed ŝi hezitis. jes, vivo estas ne nur amorado.

amorado inter normaluloj estas ordinara, tamen ĉe la ĉarma vidvino kaj la fava leporlipulo, skandalega. oni dubis aŭ ŝi tentis lin aŭ li ŝin perfortas.

ilian aferon la tuta vilaĝo sciis. la virinoj ne plu demetis lian kuloton, konsiderante ke li jam ne estas pura. la viroj ne plu postulis ke li sin nudigu ĉar ili timis ke la nudigo ofendus la vidvinon.

la vidvino ne plu ludis kun li.

krom sinmasturbado li povis fari nenion.

iufoje kiam li naĝis en la rivero en la lumo de la subiranta suno, li intencis meti sian penison en la piĉon de bovineto, kiu ĝuis la malvarmeton de la akvo.

post kelkaj tagoj viro diris al li ke knabino en la najbara vilaĝo volantas edzigi lin. laŭ la viro ŝi estis milda, laborema, ne nur sana sed ankaŭ forta. la okuloj estis grandaj kaj la hararo, longa.

la espera fajro ekrebrulis en lia koro. li senpacience demandis:

- kiam kaj kie mi povos renkonti ŝin?

- morgaŭ vespere sur la sablaĵo sur la rivero.

tien li iris kaj atendis horon.

finfine troveblis nur la bovineto kiun li intenci priamori!

li ne estis tro saĝa. kio okazis? kial tiel? dum duonokto li ne povis eltrovi la solvojn.

noktomeze li ne plu toleris la obsedon. ŝtele kiel antaŭ monatoj, li eniris la korton post la domo de la vidvino. ĉifoje ŝi ne malfermis la pordon. sed trans la pordo ŝi solvis liajn

demandojn: ho, malsaĝulo, li hazarde vidis vian fiagon kun la bovineto kaj volis fari svatadon. Ŝia tono restis dolĉa kiel antaŭe. sed li ne sentis konsolon similan al la antaŭaj. ĉe la disiĝo li forprenis ŝian kuloteton de sur la bambu-stango en la korto.

dum la postnoktomezo li estis sendorma. pensante pri la vidvino kaj flarante la kuloteton, li sin masturbis plurfoje.

tro laca kaj korpe kaj kore, li ne iris labori en la mateno. tagmeze, la familianoj lin riproĉis kaj skoldis rigore.

spite al ĉio, li elhejmiĝis nur vespere.

kunportante la kuloteton kaj botelon, li eniris la kampon de sorgo.

baninte sin en la lago, li sin masturbis lastafoje kaj ejakulis sur la kuloteton, en pura maniero. li sin revestis kaj levis la botelon.

kiam vilaĝanoj trovis la kadavron post unu tago, la kuloteto montriĝis pura krom la spermomakulo – sur kaj ĉirkaŭ ĝi ne troviĝis formikoj aŭ aliaj insektoj, danke al tio ke ĉe ĝi kuŝis la botelo kun iom da insekticido.



2010-9-18

Maupassant (1850-1893)



LA TIMO

(1882)

Al J.-K. Huysmans

Post la vespermanĝo ni resupreniris sur la ferdekon. Antaŭ ni, neniuj tremeto agitis la akvosurfacon de Mediteraneo, kiun kvieta granda luno muaris. La vasta marŝipo glitis

eljetante sur la ĉielon, kiu ŝajnis prisemita de steloj, dikan serpenton el nigra fumo; kaj malantaŭ ni, la tute blanka akvo, movata de la rapida traŭro de la peza ŝipo, batadata per la helico, ŝaŭmis, ŝajnis tordiĝi, movis tiom da helaĵoj, ke oni dirus bolantan lunlumon.

Ni estis ses aŭ ok sur la ferdeko, silentaj, admirante kun la rigardo turnata al malproksima Afriko, kien ni iris. La ŝipestro, kiu fumis cigaron meze de ni, subite reekis la konversacion komencitan dum la vespermanĝo.

– Jes, tiun tagon mi timis. Mia marŝipo, batata de la maro, restadis dum ses horoj kun tiu roko en la ventro. Feliĉe, ke vespere, ni estis savitaj de angla karboŝipo, kiu ekvidis nin.

Tiam granda viro, kun brula vizaĝo, aspektante serioza, unu el tiuj viroj, kiujn oni konscias ke ili trapasis longajn nekonatajn landojn, meze de senĉesaj danĝeroj, kaj kies trankvila rigardo ŝajnas konservi, en sia profundeco, ion de la strangaj pejzaĝoj, kiujn li vidis; unu el tiuj viroj, kiujn oni divenas trempitaj en la kuraĝo, unufoje parolis:

– Vi diras, kapitano, ke vi timis; mi tute ne kredas tion. Vi eraris koncerne la vorton kaj la sensacon kiun vi sentis. Fronte al prema danĝero, energia viro neniam timas. Li estas emociata, maltrankvila, anksia; sed la timo estas alia afero. Ridante la ŝipestro reparolis:

– Ĉu? Mi ja diris al vi, ke mi timis.

Tiam la viro, kun la sunbrunigita vizaĝo, prononcis per malrapida voĉo:

– Permesu al mi, ke mi komprenigu min! La timo (kaj eĉ la plej multmemaj homoj povas timi), estas terura io, kruelega sensensacio, kiel dispartiĝo de la animo, forloga spasma de la penso kaj la koro, kies nura memoro donas angorajn tremetojn. Sed tio okazas, kiam vi estas brava, nek antaŭ atako, nek antaŭ la neevitebla morto, nek antaŭ ĉiuj konataj formoj de la danĝero: tio okazas nur en iuj nenormalaj cirkonstancoj, sub iuj misteraj influoj fronte al konfuzaj riskoj. La vera timo,

estas io kiel svaga rememoraĵo de la iamaj fantastaj teruraĵoj. Homo, kiu kredas al la fantomoj, kaj imagas al si ekvidi nokte aperon, devas senti la timon kun ĝia plena horora teruro.

Persone, mi spertis la timon meztage, antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj. Mi denove sentis ĝin, la lastan vintron, dum decembra nokto.

Kaj tamen mi travivis multe da hazardaĵoj, multe da aventuroj kiuj ŝajnis mortigaj. Mi ofte interbatiĝis. Ŝtelistoj forlasis min kiel mortinto. En Ameriko, kiel ribelanto, oni kondamnis min al la pendumado, kaj sur la Ĉinaj marbordoj oni ĵetis min en la maron de la ferdeko de marŝipo. Ĉiufoje mi kredis min nesavebla, kaj tuj mi rezignaciis, ne kormoliĝante kaj eĉ bedaŭrante nenion.

Sed la timo ne estas tio.

Mi antaŭsentis ĝin en Afriko. Kaj tamen ĝi estas infano el la Nordo; la suno disigas ĝin kiel nebulon. Bone rimarku tion, Sinjoroj. Ĉe la Orientanoj, la vivo tute ne gravas; oni tuj rezignacias; la noktoj estas klaraj kaj malplenaj de la preme mallumaj maltranviloj, kiuj hantas la cerbojn de la malvarmaj landoj. En Oriento, oni povas koni la panikon, sed oni nescias la timon.

Nu! Jen kio okazis al mi sur tiu Afrika tero.

Mi trairis la grandajn dunojn sude de Ouargla [Uargla]. Estas unu el la plej strangaj landoj en la mondo. Vi konas la glatan sablon, la rektan sablon de la senfinaj plaĝoj de la Oceano. Nu! Imagu al vi la Oceanon, kiu estus fariĝinta sablo meze de uragano; imagu senbruan ŝtormon de senmovaj ondoj el flava polvo. Ili altas kiel montaroj, tiuj neegalaj, malsamaj ondoj, starigitaj simile al furiozaj fluaĵoj, sed ankoraŭ pli grandaj, kaj striitaj kiel la muaro. Sur tiun furiozan, mutan, nemovantan maron, la arda suda suno verŝas sian rektan kaj neeskapeblan flamon. Necesas grimpi tiujn ondojn el ora cindro, malsupreniri, denove grimpi, senĉese grimpi, senripoze kaj sen ombro. La ĉevaloj stertoras, ĝisgenue

enprofundiĝas, kaj alvare glitas sur la alia deklivo de tiuj mirigaj montetoj.

Ni estis du amikoj, akompanitaj de ok spahioj, kaj kvar kameloj kun iliaj kamelistoj. Ni ne parolis plu, premegitaj de la varmeco, la laceco, kaj sekiĝintaj pro soifo kiel tiu brula dezerto. Subite unu el niaj viroj eligis specon de krio, ĉiuj haltis; kaj ni restis senmovaj, surpriziĝintaj pro neklarigebla fenomeno, konata de la vojaĝantoj de tiuj izolataj regionoj.

Ie, proksime de ni, en nepreciza direkto, tamburo sonis, la mistera tamburo de la dunoj; ĝi distingeble sonis, jen pli vibranta, jen mallaŭtiĝanta, haltante, poste rekomancante sian fantastan tamburadon.

La Araboj, teruriĝantaj, sin rigardis reciproke; kaj unu diris, per sia gepatra lingvo: "La morto estas sur ni". Kaj subite mia kuniranto, mia amiko, preskaŭ mia frato, falis de sia ĉevalo, la kapon antaŭen, fulmrapide mortiĝinta pro sunfrapo.

Kaj dum du horoj, dum mi vane provis savi lin, tiu nekaptebla tamburo ĉiam plenigis miajn orelojn per sia monotona, intermita kaj nekomprenebla bruoj; kaj mi sentis enŝoviĝi la timo en miajn ostojn, la vera timo, la forpuŝe malbela timo, vidalvide al tiu amata kadavro, en tiu truo fajrokolorita de suno, inter kvar montoj el sablo, dum la nekonata eĥo de la rapida batado de la tamburo, ĵetis nin je ducent leŭgoj de iu ajn franca vilaĝo.

Tiun tagon, mi komprenis tion, kio estis la timo; sed aliafoje mi ankoraŭ pli sciis tion...

La ŝipestro interrompis la rakontanton:

– Pardonu, Sinjoro, sed tiu tamburo, kio ĝi estas?

La vojaĝanto respondis:

– Tion mi ne scias. Neniu scias. La oficiroj, kiuj estis ofte surpriziĝintaj per tiu bizara bruoj, ĝenerale atribuas ĝin al la pliampleksigita, multobligita eĥo, ekscese ŝveligita de la ondantaj dunoj, de hajlo de sableroj forportitaj de la vento, kiuj frapas tufon da sekaj herboj;

ĉar oni ĉiam rimarkis, ke la fenomeno okazas en la apudeco de malgrandaj plantoj, bruligitaj de la suno, kaj malmolaj kiel pergameno.

Tiu tamburo estus do nur speco de sonmiraĝo. Jen la tuto. Sed mi eksciis tion nur pli poste.

Mi alvenas al mia dua emocio.

Tio okazis dum la lasta vintro, en arbaro de nordorienta Francio. Tiom la ĉielo estis malhela, ke noktiĝis du horoj pli frue. Mia gvidanto estis kamparano, kiu marŝis flanke al mi, tra tute malgranda vojo, sub volbo de abioj, kies uragana vento eligis hurladojn. Inter la arbopintoj, mi vidis forkuri senordaj nuboj, konfuzaj nuboj, kiuj ŝajnis fuĝi antaŭ terurego. Iafoje pro grandega ventopuŝo, la tuta arbaro sin klinis samdirekte kun suferoĝemo; kaj la malvarmo invadis min, malgraŭ mia rapida paŝo kaj mia peza vestaro.

Ni devis vespermanĝi kaj tranokti ĉe arbargardisto, kies domo ne estis plu malproksima. Mi iris tien por ĉasi.

Mia gvidanto, iafoje alĉielen rigardis kaj murmuris: "Malgaja vetero!" Poste li parolis al mi pri la geloĝantoj de la domo, en kiu ni baldaŭ alvenos. Antaŭ du jaroj la patro mortigis ŝtelĉasiston, kaj de tiu tempo, li ŝajnis malserena, kiel hantata de memoraĵo. Liaj du edziĝintaj filoj, vivis kun li.

La tenebroj estis profundaj. Mi vidis nenion antaŭ mi kaj ĉirkaŭ mi, kaj la tuta branĉaro de la arboj, kiuj interkoliziis plenigis la nokton de senĉesa rumoro. Fine, mi ekvidis lumon, kaj baldaŭ mia kuniranto frapis ĉe pordo. Akrasoj virinaj krioj respondis al ni. Poste, vira voĉo, strangola voĉo, demandis: "Kiu iras tien?". Mia gvidanto nomiĝis. Ni eniris. Tio estis neforgesebla sceno.

Maljuna viro kun blanka hararo, frenezaj okuloj, enmane sia ŝarĝita fusilo, atendis nin staranta meze de la kuirejo, dum du grandaj knabegoj, armitaj per hakiloj, gardis la pordon. Mi distingis en la mallumaj anguloj du genuiĝintajn virinojn, kun la vizaĝo kaŝita kontraŭ la muro.

Oni sin eksplikis reciproke. La maljunulo relokis sian armilon kontraŭ la muro, kaj ordonis ke oni pretigu mian dormoĉambron; poste, ĉar la virinoj tute ne moviĝis, li bruske diris al mi:

– Komprenu, Sinjoro, mi mortigis viron, antaŭ du jaroj ĉi-nokte. La pasintan jaron, li revenis alparoli min. Ĉi-vespere mi ankoraŭ atendas lin.

Poste li aldiris per tono kiu ridetigis min:

– Tial, ni ne estas trankvilaj.

Mi trankviligis lin kiel mi povis, kontenta(.) pro ke mi ĝuste venu tiun vesperon, kaj mi povu spekti al tiu superstiĉa teruro.

Mi rakontis historiojn, kaj mi sukcesis kvietigi preskaŭ ĉiujn.

Apud la fajrujo, maljuna hundo, preskaŭ blinda kaj liphara, unu el tiuj hundoj kiuj similas al konataj uloj, dormis kun la nazo inter siaj piedoj.

Ekstere, la persistega ŝtormo batis la etan domon, kaj tra mallarĝa vitro, speco de luketo lokita proksime al la pordo, mi subite ekvidis, dank'al la eklumeto de grandaj fulmoj, tutan fatrason de arboj dispuŝitaj de la vento.

Malgraŭ miaj strebadoj, mi ja sentis(.) ke profunda teruro tenis tiujn geulojn, kaj ĉiufoje kiam mi ĉesis paroli, ĉiuj oreloj aŭskultis al la malproksimo. Laca pro ĉeesti al tiuj stultaj timoj, mi tuj petos, ke mi enlitiĝu, kiam la maljuna gardisto subite eksaltis el sia seĝo; denove ekkaptis sian fusilon, balbutante per deliranta voĉo: "Jen li! Jen li! Mi aŭdas lin!" La du virinoj surgenuen refalis en siaj anguloj, kaŝante al si la vizaĝon; kaj la du filoj reprenis siajn hakilojn. Ankoraŭ mi tuj provos kvietigi ilin, kiam la dormanta hundo neatendite vekigis, kaj levante la kapon, tordante la kolon, rigardante al la fajro per sia preskaŭ senflama okulo, ĝi eligis unu el tiuj malgajaj blekadoj, kiuj ekstremigis la vojaĝantojn, vespere en la kamparoj. Ĉiuj okuloj rigardis al ĝi, nun ĝi restis senmova, stariĝanta sur siaj kruroj, kiel hantata de vizio, kaj ĝi denove ekhurlis al io

